EKO 2022
Esperiga Komuniko
Subtene al la regiona, landa kaj loka agado
UEA ilei IF EF
Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Gbeglo Koffi, François Lo Jacomo

ENHAVO n-ro 8> ● AMO-rezultoj ● Katalunio. ● Ĉinio ● LS● IPR 2022/1 ● < feb. 4

# AMO 2021 arkivita ĉe <aktivulo.net>

Tra la jaro 2021 okazis dek seminarioj, kaj nun materialoj el tiuj seminarioj aperis en la retejo de UEA ĉe <aktivulo.net>. Tre facilas trovi tiun retejan adreson, ĉar la vortoj ne aperas en ajna nacia lingvo, do vi ne ricevos maldeziratajn anoncojn de sennombraj hoteloj, asocioj, projektoj, turismaĵoj kaj aliaj eĉ pli nedezirataj reklamaĵoj.


Retejo por Aktivuloj
EKO / AMO / Ni semas / Gvidiloj / FLAM
Agadaj Raportoj | Aktivula Maturigo | Pliaj projektoj | Landa agado

Universala Esperanto-Asocio
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Aktivula Maturigo - Virtuala

Hejmo » Aktivula Maturigo » Aktivula Maturigo (AMO)

Aktivula Maturigo (AMO)

**Aktivula Maturigo (AMO)** kaj rilataj seminarioj estas projekto de UEA por kapabligo de gvidantoj de Esperanto-movado kaj diskutigo de landa kaj faka agado. La projekto estas realigata kiel serio de seminarioj kutime dum aliaj renkontiĝoj diversloke sur la Tero. Lastatempe ili devis iĝi virtualaj, sed pli kaj pli iĝas hibridaj. De marto 2014 ĝis januaro 2022 okazis 82 seminarioj, en ĉiuj kontinentoj kaj almenaŭ 35 landoj. Pro plenega kalendaro por 2022, ni atingos la centaj seminarion iam en 2023.

Celaro kaj bezono por AMO

Ni bezonas kreskantan aron da aktivuloj, kiuj scias kunlabori internacie, malfermaj al novaj ideoj kaj al influoj kaj tendencoj en la granda mondo, pretaj lerni kaj adapti sukcesajn alilokajn projektojn al la propra loka situacio. Estas evidente, ke UEA devas ludi gvidan rolon en la plenumo de tiu celaro. Esperanto inter lingvoj unikas. La parolkomunumo de naciaj lingvoj renovigas sin mem; la lertigo de ties infanoj kaj junuloj okazas nature kaj intense en la familia kaj apuda medio, suplementata plej ofte per establita delonge funkcianta kaj financata infrastrukturo. Esperanto havas gravan malavantaĝon, ĉar unike ni devas krei kaj maturigi niajn proprajn novajn generaciojn sen abundaj rimedoj. Tial ni bezonas koheran planon de Aktivula Maturigo – laŭprononce: AMO. Ĝi estas tereno en kiu la centra UEA intensigas rilatojn kun siaj Landaj Asocioj (LA), kunlaborante plie kun Fakaj Asocioj (FA), Landaj Sekcioj de TEJO kaj ILEI, Esperanto-Centroj kaj aliaj. La programo funkcias per serio de seminarioj (vidu sube). Ilin loĝistike kutime prizorgos enlandaj asocioj, sekcioj aŭ E-Centroj; la programa realigo

Entute la prezento de AMO estas unuecigita kaj bonigita, dank' al la elstara kunlaboro inter AMO kaj la prizorganto de la retejo: nia redakcia teamo de Dima Ŝevŝenko kaj Anna Striganova. Tra la lastaj du jaroj la informoj aperis sub du rubrikoj; nun ĉio aperas sub unu ĉeftitolo kun aktualigita enkonduka teksto. Aperas tie detale la tabelo de AMO-seminarioj por 2020 kaj 2021, kune kun ligiloj al la materialoj el la unuopaj seminarioj. Sube troveblas aliro al la AMO-arĥivo kun materialoj por la seminarioj de 2014 ĝis 2017.

Mankas do la pretigo de la materialoj por 2018 kaj 2019, kaj se ni vekiĝos en iu glora kaj sopirata tago, en kiu ni vidas neniun devon, kiu estas pli urĝa aŭ grava, ni aliros la taskon. Pleje gravas, ke materialoj el la lastaj du jaroj estas nun alireblaj.

## AMO ja zorgas pri la vidigo kaj aliro de seminariaj rezultoj!

# JA afiŝo ja alirebla, kune kun multo pli

Sekve de nia raporto en EKO 5 pri la afiŝo por la revuo 'Juna amiko', jen el Hungario retejo kiu ebligos al vi elŝuti la afiŝon.

http://eventoj.hu/juna-amiko/

SzilvassyLaszlo

# Esperantisto elektita prezidanto de la fililogia sekcio de la Kataluna Akademio

Nicolau Dols Salas, esperantisto naskiĝinta en Majorko, estos la nova Prezidanto de la Filologia Sekcio de la Institut d'Estudis Catalans, kiu estas konsiderata kiel la Akademio de la Kataluna Lingvo.

Nicolau Dols estas profesoro de la Universitato de Balearoj kaj de la Postdiplomaj Studoj pri Interlingvistiko de Universitato de Poznano. Li estis kunprezidanto de la organiza komitato de la ILEI-kongresa simpozio "La kultura heredaĵo de Esperanto", kiu okazis ene de la 51-a Kongreso de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) kunlabore kun la Nacia Universitato de Neĉeesta Edukado (UNED) kaj Hispana Esperanto-Federacio (HEF) en ejoj de UNED en julio 2018. Li gajnis la unuan premion en la branĉo 'Poezio', en la Belartaj Konkursoj de 2017, per la poemo "Pasio. Poemo en ses stacioj".

El: Bitbulteno 78 de HEF

# Universitata kurso kun kreditoj en Ĉinio

Finiĝis E-kurso ĉe la Universitato de Nanchang la 6-an de januaro, 2022. Dudek du studentoj el 14 fakoj de la universitato trapasis la finan ekzamenon. La kurso havas 32 horojn, ĉiuĵaude posttagmeze po 2 lernohoroj. Tiuj kiuj sukcese trapasis la ekzamenon ricevos 2 kreditpoentojn. La E-kurso ĉe la Universitato malfermiĝis ekde 2004, ne ĉiujare, sed dum lastaj 6 jaroj, la frekvenco malfermi la E-kurson multiĝas pli ol antaŭe, ĉiujare eĉ ĉiusemestre ekde 2020 funkcias E-kurso, kaj Esperanto allogis intereson de pli da studentoj. La Universitata E-Asocio por studentoj ĵus festis sian dek-jariĝon kaj ricevis laŭdon de la rilata administra institucio.




Okazis celebra aktivado per deklamado de poemoj de Zamenhof. La aganto de ILEI, Arko, donacis al ĉiu studento aŭ E-libreton aŭ E-stelon aŭ E-libromarkon aŭ la revuon *Juna Amiko*.

Finiĝis la Eo-kurso ĉi-semestre, venis bona informo el la instrua platformo, 60 studentoj elektis Eo-kurson de la venonta semestro, kiu malfermiĝos fine de februaro. (60-kapa kurso estas la maksimumo akceptita de Arko mem).

Arko, antaŭa estrarano de ILEI.

## Proponoj de la Libroservo de UEA – Moliero kaj Miĥalski

En 2022 UEA memoras 125 jarojn de la naskiĝo de Eŭgeno Miĥalski kaj 85 jarojn de lia morto. Miĥalski naskiĝis la 21-an de januaro 1897 en Ukrainio. Poeto aktiva en la proleta Esperanto-movado, profesie li laboris kiel instruisto-bibliotekisto. Li eklernis Esperanton en 1911. En 1917 li fondis la literaturan revuon Libera Torento. Li frue aliĝis al SAT. Pro senbaza politika akuzo li estis kondamnita al morto, mortpafita la 15-an de oktobro 1937. La #LibroservodeUEA proponas tri kolektojn de tiu brava aŭtoro, kiu estos omaĝata de UEA en la 135-jariĝo de #Esperanto #NiaLingvo: https://katalogo.uea.org




Prologo: https://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=2727

Fajro kuracas: https://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=1678

Plena poemaro: https://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=4810

### Moliero atingebla por esperantistoj

La 15-a de januaro estis la 400-a datreveno de la bapto de Molière: lia naskiĝdato ne estas konata! Pri tio UEA informis en siaj sociaj retoj: Facebook, Instagram kaj Twitter. La #LibroservodeUEA proponas de la franca teatra majstro la sekvajn :

*Tartufo* en traduko de A. Cherpillod (https://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=8825),
*Kleraj virinoj* (https://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=4185),
*La nobela burĝo* (https://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=2563)
*La trudita edziĝo/Le mariage forcé* (dulingve) (https://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=8197), ankaŭ en traduko de Cherpillod.




Brokante estas ekzempleroj de *Georgo Dandin*, en traduko de L. L. Zamenhof: https://katalogo.uea.org/katalogo.php?st=brok&tit=dandin&listigu=Trovu.

Legu pri Molière ĉe Vikipedio: https://eo.wikipedia.org/wiki/Molière. La Franca Komedio (https://eo.wikipedia.org/wiki/Franca_Komedio) prezentos *Tartufon* (https://www.comedie-francaise.fr/fr/evenements/le-tartuffe-ou-lhypocrite) de kiu estas la indikita traduko en Esperanto.

Fernando Maia Jr.
**Universala Esperanto-Asocio |** Vicprezidanto

# Aŭstralio eksciis pri AMO, preparas sin por propra

Dum la Kongreso de Aŭstralio kaj Nov-Zelando en januaro 2022 la patro de AMO ricevis inviton prezenti la programon. La ideo organizi seminarion dum la mallonga kongreso ne sukcesis pro jam plena programo. Sed la prezento de AMO en la kongreso preparis la vojon por seminario en pli trankvila parto de la jaro. Tio estas nun programita por dimanĉo, la 12a de junio en horo kiu konvenas por Aŭstralio kaj Eŭropo kaj Afriko.

Ĝi estas nun spektebla ĉe nia jutuba kanalo "Esperanto Australia"

**AMO de 2014 ĝis Aŭstralio en 2022**

# IPR pedagogiumas sin al 2022

## Pri la enhavo de IPR 2022/1 (Jarkolekto 52)


- Enkonduko (Ahmad Reza MAMDUHI) p.3
- KIMURA Goro: Konsciigo pri interlingva komunikado en universitato p.4
- Alessandra MADELLA: ILEI dum la 41-a Sesio de la Ĝenerala Konferenco de UNESKO p.6
- Alessandra MADELLA: La projekto „30 Oraj Horoj” de ILEI prezentita kadre de la projektoVERDEN p.11
- Larysa OSADCHUK: Kiel atentigi pri Esperanto per origamio p.14
- Mireille GROSJEAN: Pri distanco, sed ne pri viruso / Kapsulo p.19
- Mireille GROSJEAN: Nova eldono de lernolibro de Eo en la svahila p.21
- Javier ALCALDE: Esperanto kaj sociaj sciencoj (II.) p.22
- El la landoj kaj sekcioj (AL, FR, DE, IT, UA) p.25
- Kvin temoj por 2022 (Stefan MacGILL) p.29
- Hans E. BECKLIN: Gobbo, Federico. Amikaro (recenzo) p.31
- Informoj pri ILEI, redakciaj informoj p.36
- Adresaro de funkciuloj de ILEI p.38


========= vortoj: 1110 =========


- Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

- Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis la **fino de 2021** (per EKO 2021-58). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.
- **ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.
- **SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.